

KIU
MORTIGIS
LA
BEBON?





PRILABORIS TIUN ĈI KOMIKSON:

Vitor Luiz Rigoti dos Anjos (Esperantigo)
vitorluizpedro@hotmail.com

Pavol Petrík (Revizio)
petrikpavol@zoznam.sk

Petr Adam Dohnálek (Korektoj kaj Bildoj)
pa.dohnalek@gmail.com

Oni povas libere kopii, dissendi, printi, ktp.

Tradukita kaj adaptita el la angla kontraŭ-abortiga libreto "Who killed Junior?", amase eldonita en 1973 de ĵus fondita organizo "Right to Life" ("Viv-raĵto"), tuj post la decido de plejalta nord-amerika tribunalo pri la jur-disputo "Roe kontraŭ Wade". Vidu pliajn informojn ĉe:
<http://www.ep.tc/junior/>

UNUA SEMAJNO

Fekundita ovulo atingas
la patrinan uteron.

Nova homo
ekevoluas.



DUA SEMAJNO

La nova vivulo ekricevas
patrinan nutraĵon.



DE TRIA ĜIS KVARA SEMAJNO

Formiĝas
okuloj, cerbo, mjelo, pulmoj,
stomako, hepato kaj renoj;
koro ekpumpas!



KVARA SEMAJNO

Kapo formiĝas.

Vertebraro pretas, mjelo jam fermiĝis.

Evoluas brakoj kaj gamboj.

La koro pulsas.




KVINA SEMAJNO

Ekzistas apartaj torako kaj abdomeno.

Okuloj enhavas retinon kaj lenson.

Oreloj formiĝas.

Kaj la brakoj kaj la gamboj jam finiĝas
per fingroj.



DE SESA ĜIS OKA SEMAJNO


Ĉiuj organoj enestas.

La kapo estas preta.

Formiĝis ankaŭ vizaĝo, buŝo kaj lango.


La cerbo kompletas.

La bebo povas senti tiklojn.



OKA SEMAJNO

La bebo havas ĉiujn fingrojn,
eĉ jam kun fingrosignojn, kiuj
samos dum la tuta vivo.



DE DEK-UNUA ĜIS DEK-DUA SEMAJNO

Ĉiuj korpaj sistemoj funkcias.

Nervoj kaj muskoloj interakordiĝas.

La brakoj kaj kruroj moviĝas.

Aperas ungoj.

La bebo jam pezas ĉirkaŭ 30 gramojn.



Post tri monatoj
la infano jam
formiĝis.
Ĝi nun devas
nur kreski.



Sed ĝia patrino kun kuracisto pridecidas
jam manieron mortigi ĝin!


KIUMANIERE ONI MORTIGAS BEBON EN LA PATRINA UTERO ?

Estas pluraj metodoj

- ĉiuj kruelaj kaj nehumanaj.

Kiel la bebo estos mortigita?

Ajnmaniere, ĝi suferos!



1 - LA SUÇ-METODO

Kvazaŭ polv-suĉilo,
foriganta ĉian
rubaĵon.



La infano eliĝas
dispecigita.

2 - LA TRANÇ-METODO

Unue, la kuracisto
dispecigas la infanon.



Poste, oni ĝin eltiras el la patrino utero.

3 - LA KIRURGIA METODO


Kuracisto malfermas
la patrinan ventron
kaj eltiras la vivan
infanon.



La beboj estas uzataj por eksperimentoj,
aŭ bruligitaj aŭ dronigitaj.

4 – LA SALSOLVAĴA VENENIG- METODO

Kuracisto injektas
salsolvaĵon en la uteron.



La infano mortas bruligite
post kelkhora agonio!

Multaj inoj stulte diras: "mi ja havas
rajton je mia korpo".

Tamen tio ne estas vero! Dio havas rajton
je ĝi antaŭ ol ni mem.

Krome, neniuj virinoj rajtas je la vivo de sia
bebo, ĉar la infano estas jam alia estaĵo,
aparta persono!


JESAJA 49, 1: "la ETERNULO min alvokis el
la ventro, el la interno de mia patrino Li
vokis mian nomon..."




Kiam iu homa leĝo
kontraŭas la Dian,
ni devas sekvi la
Dian prioritate.



Neniu rajtas
neniigi homan
vivon kreitan
de Dio.



Vi estas homo kaj bezonas scii, ke
abortigo signifas mortigi homan estaĵon.



Ĝi ne similas
simplan
operacion de
tonsilo.



Beboj en aĝo de dek
tri semajnoj luktos
por vivi dum du aŭ tri
horoj post abortigo.

KION DIO DIRAS PRI VIVO EN PATRINA VENTRO?

"Antaŭ ol Mi formis vin en la utero, Mi vin konis, kaj antaŭ ol vi eliris el la ventro, Mi vin sanktigis." (Jeremia 1, 5)

"Ĉar Vi kreis mian internaĵon, formis min en la ventro de mia patrino."
(Psalmaro 139, 13)

"Lin kreis ja Tiu sama, kiu kreis min en la ventro, kaj Tiu sama pretigis en la ventro ankaŭ lin." (Ijob 31, 15)

"Ĉar detempe de mia juneco mi estis kiel patro, kaj de post la eliro el la ventro de mia patrino mi estis gvidisto."
(Ijob 31, 18)

"Jen, heredo de la Eternulo estas infanoj; rekompenco estas la frukto de ventro."
(Psalmaro 127, 3)

La Biblio diras, ke la pratempa izraela popolo profunde respektis la vivon. La manko de filoj estis konsiderita kiel ia puno al la tiamaj virinoj.

"Kiam Raĥel vidis, ke ŝi ne naskas al Jakob, ŝi enviis sian fratinon, kaj ŝi diris al Jakob: 'Donu al mi infanojn, ĉar alie mi mortos'. Kaj Jakob forte ekkoleris Raĥelon, kaj li diris: 'Ĉu mi anstataŭas Dion, kiu rifuzis al vi frukton de ventro?' "

(Genezo 30, 1-2)


En Genezo 21, 6 oni povas legi la rakonton de la nefekunda Sara, kiu post la beno de Dio, naskis filon al Abraham. Sara tiam diris: "Ridindaĵon faris al mi Dio; ĉiu, kiu aŭdos, ridos pri mi."



"Kaj dum li ĉi tion parolis, unu virino el la homamaso levis sian voĉon, kaj diris al li: 'Feliĉa estas la ventro, kiu naskis vin, kaj la mamoj, kiujn vi suĉis'." (Luko 11, 27)



"Kaj kiam Elizabeto aŭdis la saluton de Maria, la infaneto eksaltis en ŝia ventro; kaj Elizabeto pleniĝis de la Sankta Spirito, kaj ŝi levis sian voĉon per laŭta krio, kaj diris: Benata vi estas inter virinoj, kaj benata estas la frukto de via ventro. Ĉar jen kiam la voĉo de via saluto



venis en miajn orelojn, la infaneto ĝoje eksaltis en mia ventro."

(Luko 1, 41-42.44)


ĈU VI TION SCIAS ?

- Plejmulto de abortigoj kaŭzas komplikojn, kiuj povas malpermesi estontan gravedecon, krom kaŭzi la plejmulton de patrinaj mortoj, ĉefe inter la virinoj en fekunda aĝo.
- La plej kutimaj komplikoj estas: infekto, embolio, trapiko aŭ vund-ŝirado de la utero, problemoj divenitaj de la anestezo, konvulsoj, akuta hemoragio, cervikaj damaĝoj kaj endotoksa ŝoko.
- La damaĝoj al la utero povas evolui al problemoj kiuj bezonas histerektomion (operacio por forigi la uteron).
- Pli ol triono da virinoj kiuj praktikas abortigon havas psikologiajn problemojn poste (laŭ japanaj esploroj, kiuj ankaŭ indikas, ke en Nagojo, 59 % da virinoj fariĝis "serioze perturbitaj" aŭ "malpli sanaj ol la kutimo" post la abortigo), kaj 65% el ili disvolvas deprimon.
- Abortigoj estas duoble pli danĝeraj ol naskoj (US Bureau of Vital Statistics - la Hospitalo de Cincinnati kalkulas 1,84 mortojn po 10 mil naskoj, kontraŭ 7,7 mortojn po 10 mil abortigoj kalkulitaj en Maryland).

Se vi troviĝas en problemoj pro la
gravedeco, neniam pensu tion, ke la
abortigo estas facila situacio.

Ekzistas multaj senskrupulaj medicinistoj
kiuj al vi diros, ke tiu estas facila vojo,
sed ili pli obsedas vian monon ol protekti
la vivojn de vi kaj de via bebo.





LABORO DUM UNU MATENO ĈE ABORTIGA HOSPITALO.

LA SAMA MALBONO OKAZINTA EN NAZIA
GERMANIO, DUM LA DUA MONDMILITO,
KAJ KIUN LA ALIANCANOJ TIAM
KONTRAŬBATALIS, DAŬRE OKAZAS NUN,
EN PLURAJ LANDOJ DE LA MONDO, EĈ EN
NIAJ PROPRAJ LANDOJ ! NEKREDEBLA, SED
TIA ESTAS LA REALO!

HOMAJ ESTAĴOJ MORTIGITAJ KAJ
FORĴETITAJ EN RUBAĴEJON.